# « Le Groupe Esperanto du Maine » salutas vin !

## *Bonvenigaj vortoj*


**« Malforta kandelo venas, mallumo jam ne tute plenas »**

***Proverbo de Marjorie Boulton, 1924-2017***

## *Enhavo*


| | |
|---|---|
| Sarta arkivo pri esperanto | P1 |
| Vizitu *Malicorne-sur-Sarthe* | P2-3 |
| Statistikoj pri Ea Kongresoj | P4 |
| Homaj Rajtoj | P5 |


## Revuo Sarta Stelo en 1913



SÉANCE DU COMITÉ (8 Octobre 1913)

Présidence de M. LE BIHAN.

*Présents :* MM. Autin, Canaguier père, Lebreton, Legrand, Mlles Buon, Chanteloup, Ponthieux.

*Excusés :* MM. Grégoire et Mouillard.

Le Président fait connaitre que M. le Dr Dieu, trop absorbé par ses occupations, ne pouvant assister régulièrement aux réunions, a donné sa démission de membre du Comité. — Cette démission est acceptée, et M. le Bihan est chargé d'exprimer à M. le Dr Dieu les regrets du groupe.

Le Président raconte brièvement son voyage à Rome, à l'occasion du Congrès Espérantiste. Une réception grandiose a été réservée aux Espérantistes par le Pape. Ceux-ci devaient être présentés par le Cardinal Vivès qui s'intéressait à l'Esperanto. Le Cardinal mourut le jour de la présentation. Malgré ce deuil, le Pape consentit à recevoir les Espérantistes dans la cour Saint-Damaze; la musique pontificale assistait à la réception.


Au cours de son voyage, M. Le Bihan eut l'occasion de rencontrer Mme Tiard qui le chargea de la rappeler au bon souvenir des espérantistes manceaux. Il s'acquitte de cette mission. Le Comité adresse à son tour à Mme Tiard son meilleur souvenir.

Le Comité adresse à Mme Carlo Bourlet et à Mme Leroux-Tillé et à leurs familles, l'expression de ses sentiments de condoléance.

Il adresse ses fécilicitations à M. Chaignon, Secrétaire-adjoint, à l'occasion de la naissance de sa fille.

*Interesa anekdoto rakontita en la sarta revuo,* ***oktobro 1913***

Dum esperanta kunveno de la sarta grupo, la prezidanto rakontis sian vojaĝon en Romo, Italio, okaze de iu esperanta kongreso. Granda ceremonio estis organizita por la esperantistoj. Ili devus esti prezentataj al la Papo dank'al la Kardinalo Vivès kiu interesiĝis pri esperanto. Bedaŭrinde la Kardinalo forpasis la tagon mem de tiu prezento. Malgraŭ tiu funebro, la Papo konsentis ricevi la esperantistojn en la korto Sankta Damaze.



*Kardinalo José de Calasanz*
*Félix Santiago Vives y Tuto*
*15/02/1854 (Barcelono-Hispanio)*
*07/09/1913 (Monte Porzio Catone -Italio)*
*Konsekrita Kardinalo en 1877.*
*Li estas entombigita en sia denaska vilaĝo kie monumento estis konstruita honore al li.*

## AŬTUNO

Aŭtuno nebula !
Arbar' nudiĝanta
Kun vento bruegas,
Ĝi ŝajnas ploranta
Pri ĉarma printempo,
Pri bela somero...
Kovriĝas per koto
De pluvo la tero ;

Bluaĵo ĉiela
Enua nubiĝas,
Kaj suno de l'tero
En nuboj kaŝiĝas :
La kampo senhomaj
En sola silento,
En ili flugadas
kaj ploras nur vento !

D.Jegorov



Parko *Monod* en la urbo *le Mans*

# Ni vizitu *Malicorne-sur-Sarthe*

*La Kastelo*



En la impona kastelo de la vilaĝo *Malicorne-sur-Sarthe* alvenadis por loĝi la nobelaro de la regno inter kiuj *S-ino de Sévigné* (1626-1696) por eskapi sin el la pariza tumulto.
Samepoke, la vilaĝo instalita sur argilminoj decidis profiti de tiu riĉaĵo jam rimarkita ekde la roma periodo, kaj kreis unu el la plej grandaj francaj produkt-metiejoj de fajencaĵoj.
Cetere la metiistoj ellaboris apartan teknikon de aĵuro konsistanta en eltranĉo de desegnaĵoj el la pastaĵo, antaŭ la bakado.
Loka muelejo de la 18-a jarcento helpis al premado de naturaj pigmentoj por fabriki emajlojn.
La unua fabriko malfermis en la jaro 1747.
De tiu epoko *Malicorne* iĝis unu el la plej fama loko de francaj fajenc-fabrikoj.
Tamen *Malicorne* ne atendis la famon de siaj fajencoj por sciigi sian propran vivarton !

*La Muelo de Malicorne*



La kastelo longe estis kutima etapo por la reĝa aŭ pariza nobelaro.
Post la reĝo Luizo la 13-a (1601-1643) kaj post *S-ino Marie de Médicis* (1575-1642) *S-ino de Sévigné* ŝatis la loĝejon kaj la vilaĝon. Ŝi kromnomis ĝin *Sylvie** rilatigante al la arbaro Sankta Silvestre, kaj menciis ĝin plurfoje en sia korespondado.
Veturante de Parizo al ŝia kastelo *Les Rochers* apud la urbeto *Vitré* ŝia ekip-servo kaj ses ĉevaloj trapasis la vilaĝon *La Suze*, trairis la arbaron *Longaunay* kaj alvenis en *Malicorne.*
Tie la karoso malsupreniris la straton *Bel-Ebat* kaj ĉirkaŭiris la romanikan kirkon fonditan en 1080.



*La Pieto el terakoto*







S-ino *de Sévigné* eniris ĝin ĉiufoje por admiri la gotikan kuŝo-statuon de la kavaliro *de Chaources* kaj la gracian 16-jarcentan Pieton el terakoto.
Post trarigardo al la retrovita rivero Sarthe en sia plej granda larĝo tuj aperis la kastelo de ŝiaj geamikoj *Beaumanoir-de-Lavardin*.

Kiam ŝi trapasis la ĉirkaŭfosaĵon kie ankoraŭ nun speguliĝas du el la turoj, kiujn ŝi konis, la markizino trovis la akceptejon kaj la malvarmetecon delikataj.
« Mi neniam vidis plej bongustan manĝon kaj plej agrablan domon » ŝi skribis al sia filino la 23-an de Majo 1671.
Dum decembro estis periodo por gustumi grasajn kaponojn pri kiuj la tuta regiono sekrete konservis la recepton.
Kelkfoje dum la manĝo la kaponaĵo estis antaŭitaj de kuniklidaĵo kun bruna saŭco aŭ de pasteĉo el fazano, ĉasbestoj kiujn oni ĉasis en la parko kaj kiujn ŝi ŝategis.

** Sylvie : latindevena vorto kiu signifas « arbaron »*

## Kelkaj vidindaĵoj en *Malicorne*

**La preĝejo Sankta Sylvestre** kies konstruo datiĝas de 1080. Ĝi estas romanika kaj havas imponan sonorturilon, malregule aĵuritan. En la kapelo Sankta *Anne* oni malkovras la kuŝo-statuon.



*La Kuŝo-statuo de Chaources*



*La Preĝejo Sankta Sylvestre*

**La Kastelo de Malicorne** , 18a jarcento, protektata per profundaj foskavoj. Malantaŭ la kastelo oni povas admiri belan parkon.

**La muelo,** kiu atestas de iu freŝa paseo kiam la rivero estis energia fonto. La motora forto de akvo estis uzita en la muelo por premadi la necesajn pigmentojn.

**La muzeo de la fajenc-fabriko,**
https://musee-faience.fr/




Fotis la aŭtoroj

## *Kelkaj statistikaĵoj pri la UEA-Kongresoj inter 1905 kaj 2019*

Dum 114 jaroj okazis 104 kongresoj, bedaŭrinde mankis pluraj, dum 10 jaroj, pro la du mond-militoj. (1914-1918) (1939-1945).



La unua kongreso en 1905 kie kunvenis pli ol 700 homoj

La urbo kie kuniĝis la plimulto de esperantistoj: Varsovio, en Pollando, 1987: 5946 homoj
La urbo kie kuniĝis la malplimulto de esperantistoj: San Fransisko, en Usono, 1915, 215 homoj.
Tiu kongreso sekvis tiun de 1914 en Parizo, kiu estis nuligita pro la mond-milito kaj kie 3739 vizitontoj estis atendotaj.

## *9 kongresoj kuniĝis pli ol 3000 homoj (de 3033 ĝis 5946)*

Aŭstrio (1924,1992)
Bulgario (1963, 1978)
Francio (1914-nuligita, 1998)
Germanio (1923)
Hungario (1966, 1983)
Pollando (1959,1987)




## *35 landoj organizis universalajn kongresojn de 1905 ĝis 2019*

Anglio, Argentino, Aŭstralio, Aŭstrio, Belgio, Brazilo, Bulgario, Ĉeĥio, Ĉinio, Danio, Finlando, Francio, Germanio, Grekio, Hispanio, Hungario, Islando, Italio, Izraelo, Japanio, Kanado, Kroatio, Kubo, Lituanio, Nederlando, Norvegio, Pollando, Portugalio, Slovakio, Svedio, Svisio, Serbio, Sud-Koreio, Vjetnamio, Usono.

Mankas afrikaj landoj, sed en 2024 Tanzanio, orienta lando de Afriko invitas la esperantaron en la urbo Arusha por kongresi.

## *Landoj kiuj organizis la plej grandan nombron de kongresoj UEA inter 1905 kaj 2019*

| | |
|---|---|
| Anglio : | 8, la unua en 1907 |
| Germanio : | 8, la unua en 1908 |
| Francio : | 7, la unua en 1905 |
| Pollando : | 7, la unua en 1912 |
| Svisio : | 6, la unua en 1906 |
| Nederlando : | 5, la unua en 1920 |

**UNIVERSALA DEKLARACIO**

**DE LA HOMAJ RAJTOJ**

**Artikolo 3**

*Ĉiuj havas la rajton je vivo, libereco kaj persona sekureco.*

**Artikolo 4**

*Neniu estas tenata en sklaveco aŭ servuteco ; slaveco kaj sklavkomerco estas malpermesitaj en ĉiuj siaj formoj.*

**Artikolo 5**

*Neniu suferus torturon aŭ kruelan, nehoman aŭ sendignigan traktadon au punon.*

Eldonis UEA en 2016




# La GEM bondeziras al ĉiuj agrablajn jarfinajn festojn

